

decidita por foriri, ekpretiĝis por akompani ŝin ; invitu viajn amikojn ; via elekto nepre estos bona.

Kaj ĉar don Luis insistis por akompani ŝin, ŝi aldonis :

— Vi devigos min reeniri kaj atendi vin, ĉar mi neniam konsentos, ke iu el miaj kapricoj kostu al vi plezuron. Mi estas laca ; sed mi volas, ke vi restu, ŝi ripetis, cetere Antonio estos kun mi.

Li kisis ŝian manon, kaj levinte ŝin per siaj brakoj li sidigis ŝin sur la kusenojn de la palankeno. Apenaŭ ŝi sidis, kiam la malpeza portilo, levita de kvar Indanoj, ekmoviĝis, akompanata de Antonio antaŭiranta kvin aŭ ses rajdantojn kun armiloj. Kiam ili estis for de la urbo, oni ekbruligis torĉojn por lumigi la vojon, kaj, post unu horo, apogiĝinte sur la balkonon, la kreolino, kun la haroj malligitaj, ŝajnis profunde pripensi.

For estis don Luis, estis nokte, kaj la fajro, kiu kutime anoncis, ke oni atendas la mastron, ne brilis supre de la ŝtonegoj. Nenia venteta blovo ; nur reĝis la granda silento de la dezerto. Iam kaj iam, malpreciza krako aŭdiĝis sur la montsuproj, arbo venkita de la jaroj ekfalis, akompanata de la sovaĝa krio de rabobirdo timigita. Subite dona Lorenza ekstremetis ; ŝi klinis la kapon teren por aŭskulti ; rideto lumigis ŝian vizaĝon, la mallaŭta galopado de ĉevalo alproksimiĝis.

— Mi rapide faris miajn invitojn, kaj mi esperis atingi vin, diris don Luis aperante ; viaj portistoj sendube kuris.

Anstataŭ respondi, dona Lorenza ĉirkaŭprenis sian edzon per siaj brakoj kaj longe restis alpremiĝanta kontraŭ li.

— Kio estas al vi ? fine demandis don Luis.

— Nenio ; mi amas vin ! diris la juna virino, forkurante al sia ĉambro.

Laŭ la vero, Lorenza kruele suferis vidante sian edzon delogita de la kantistino, kaj la ĝemego, kiun ŝi ĵus silentigis estis malsekiginta ŝian vangon per larmo, kiun tamen ŝi sukcesis kaŝi.

IV

La morgaŭan kaj la postmorgaŭan tagon, don Luis foriris nur je la noktigo. Li fervore zorgis por ornami la *haciendon*, kies vojon kaj grandan korton kondukantan al la loĝejo Indanoj estis komisiitaj por purigi je la malprofito de aliaj laboroj. Dume, dona Lorenza apenaŭ forlasis sian hamakon, kaj ŝajnis apenaŭ interesiĝi je la miloj da preparaj zorgoj de sia edzo. Tiu ĉi, ebriigita de la pensado ricevi sub sia tegmento la virinon, kies koketaĵoj kaj stranga beleco maltrankviligis lin, apenaŭ povis kaŝi sian ĝojon. Alvenis la tago tiom dezirita, kaj, ĉirkaŭ la unua de la pottagmezo, la malpacienca don Luis foriris renkonte al siaj gastoj.

Dona Lorenza estis okupata je sia tualetto, kiam ŝia edzo sidiĝis sur la selon ; je la konata bruo de la paŝado de lia ĉevalo, ŝi alkuris sur la balkonon, lin salutis per la mano, kaj vidis lin enirantan galope inter la ŝtonegojn. Jam de longe li estis malaperinta, kiam, malatenta, senmova, la juna virino ankoraŭ rigardis la vojon, supre de kiu flirtis grandaj papilioj, kaj kiu ŝajnis surŝutita per purpuraj kaj ĉielbluaj floroj, kiam ĉiuj kune staris sur ĝi.

La vetero promesis esti bela ; maldikaj blankaj nuboj, pelataj de malvarmeta venteto, trakuris la ĉielon kaj moderigis la varmegon de la suno. La neĝkovrita pinto de Orizavo, vualita de amaso da nuboj, iam kaj iam seniĝis je sia fulmotondra krono kaj aperis brilega. Tiam la vulturoj, kiuj ŝajnis elekti tiun altegaĵon kiel celon de sia kuraĝega flugado, ekfrapis la aeron per siaj potencajflugiloj, kaj desegnis grandajn kurbojn aŭdigante raŭkajn kaj daŭrajn kriojn.

Je la dua, sonigante la plankojn kaj la pavimojn per la kalkanumoj de la beletaj botoj, per kiuj ŝi estis piedvestita, dona Lorenza malsupreniris sur la terason, kie oni estis pendiginta duan hamakon apud la ŝia. Per kaprico eble pripensita, ŝi estis vestita je l' antikva kostumo de rajdistinoj de sia lando: jako el ruĝa veluro, brodita je arĝento, metita sur korsaĵo el blanka atlaso. La nigraj haroj de la kreolino, plektitaj kune kun arĝentaj kaj purpuraj fadenoj, formis dikajn harligojn, kiuj falis libere kaj alligiĝis al zono el Ĥina krepo volvita ĉirkaŭ ŝia maldika kaj gracia talio. La jupo el la sama ŝtofo kiel la jako, kaj kiel ĝi ornamita per arĝentaj brōdaĵoj, ne kovris la piedojn. Ĉapelo el mola felto, sur kiu fiere leviĝis papaga plumo, plenigis tiun ĉi originalan tualeton. En tiu ĉi momento, dona Lorenza estis envolvita de silka skarpo per kiu ŝi ŝajnis ludi, jen drapirante sin ĝis la okuloj per la maldika ŝtofo, jen lerte almetante ĝin sur tiun el siaj ŝultroj, kien fiksi ĝin plaĉis al ŝi.

Subite Indanoj ĉe la rando de l' arbaro pafis al la ĉielo raketojn, sen kiuj neniam ia festo estas perfekta en Meksiklando, kaj kies bruegaj eksplodoj vekis milojn da malproksimaj eĥoj. Baldaŭ aperis la kantistino akompanata de dudeko da rajdantoj.

Laŭ la etiketo de sia lando, dona Lorenza leviĝis el sia hamako nur kiam la vizitantino, desaltinte de ĉevalo, aliris al ŝi kondukata de don Luis. Tiam ŝi ĉirkaŭis ŝin per sia dekstra brako; kaj farante la saluton, kiu tiom amuzis don Alberton, ŝi frapetis al ŝi la ŝultron per la fingroj. Per escepta ĝentileco, ŝi cedis al la fremdulino la hamakon, kiun ŝi okupis, kaj etendis sin sur la alian, kun tiu ĉi facileco, kiun la Eŭropaninoj, eĉ post dudek jara loĝado en Meksiklando, ne povas akiri, same kiel ili ne estas kapablaj ellerni la multajn manierojn moveti ventumilon aŭ drapiri sin per skarpo.

La kantistino estis vestita per serioza rajdkostumo el reĝoblua drapo; sed pro la klimato ŝi estis anstataŭinta la kutiman rondforman ĉapelon per ĉapelo je stilo Ludoviko XV kiu cetere taŭgis al ŝia vizaĝo. Ne nur la ĉapelon sed ankaŭ la tutan kostumon de tiu epoko estus elektinta la kantistino, se ŝia gusto estus egalinta ŝian belecon. Ŝi estis belkorpa; tamen en ŝia paŝado kaj en ŝiaj gestoj vidiĝis tiu ceremonieco kaj tiu rigideco Brita, kiun la Amerikanoj ne ĉiam sukcesas forigi. La mallerta maniero, en kiu la kantistino sidiĝis sur la hamakon al ŝi prezentitan, naskis sur la lipoj de dona Lorenza rideton apenaŭ videblan.

Alberto, malpli parolema ol kutime, malŝatis ĉiunminute uzi sian okulvitron por pli bone rigardi. La kostumo de la kreolino, tiel multekosta, tiel beleta, tiel nova por li, entuziasmigis lin, kaj li miregis pri la facileco, kun kiu dona Lorenza, dum ŝi parolis, levis aŭ mallevis sian skarpon, fermis aŭ malfermis sian ventumilon, kaj sciis kun incitema ĉasteco, malkliniĝi aŭ renversiĝi sur la molajn kusenojn de sia movebla kuŝilo. Sinjorino Wilson, ĝenata sur sidilo nekutima por

ŝi, sentis sian malsuperecon, kaj petis por vidi pli proksime la lagon, kies pitoreska situacio altiris ŝian atenton. Dona Lorenza tuj leviĝis, kaj, gvidataj de don Luis, la du virinoj trairis la herbejon.

Ili estis preskaŭ samkreskaj; sed la paŝado malrapida, katina, de dona Lorenza superegis dank' al ŝia natura ĉarmo la movadojn pli lernitajn, pli teatrajn de la kantistino. La babilema Alberto tion rimarkigis al Eŭropanoj invititaj de don Luis kune kun liaj samlandanoj. Post mallonga promenado, ili revenis al la korto, kie ili estis lasintaj la ĉevalojn, kiuj kun la kapo mallevita, la oreloj pendantaj, la kruroj fleksiĝintaj, la okuloj duone fermitaj, havis tiun ŝajnon de lacegeco, kiu ofte trompas la fremdulojn. Tuj kiam la rajdantoj sidiĝis sur la selon, la bonaj bestoj komencis saltegi, piedfrapadi la teron, mordeti sian haltigilon kaj elmontri per blekoj sian nedeteneblan senpaciencon.

SinJORINO Wilson, dank' al afableco de la prefekto de Kordovo, rajdis sur belega ĉevalino kun blanka felo, obeema besto, kies kutima irado estis la rapida paŝado de vojaĝaj ĉevaloj en Meksiklando. Subite la kantistino rimarkigis, ke don Alberto forestas. Oni ekserĉis la Francon, kiun oni trovis starantan sur ŝtonego; de tiu altaĵo li amuziĝis ĵetante ŝtonojn en la lagon, rigardante ilin turnadi kaj malaperi en ĝiajn misterajn profundaĵojn.

Oni alkondukis la rajdbeston de dona Lorenza, malgranda ĉevalo el la Andaluza raso kun ebonnigra felo, densaj kolharoj, grandaj naztruo kaj sovaĝaj okuloj. Ĝi furioze levis sin jen sur la antaŭaj jen sur la malantaŭaj piedoj, skuis sian haltigilon, kaj penis forkuri el la manoj de Antonio, tute okupata por kvietigi ĝin.

Dona Lorenza, kun sia skarpo ligita sur la ŝultro, kun malgranda vipeto en la mano, ŝajnis atendi. Sia edzo, jam sur sia ĉevalo, saltis teren kaj alkuris; videbla ruĝeco koloris liajn vangojn bronzkolorajn.

— Dankon, diris al li lia edzino apogiĝante sur lian ŝultron dum li helpis ŝin por sidiĝi sur la selon; ĉu eble vi forgesis min? Nu, ŝi aldonis amike frapante lin per sia vipeto, zorgu pri nia gastino, mi ne scias pro kio, sed ŝajnas al mi, ke tiu ĉi bela *señora* estas malpli senĝena sur ĉevalo ol antaŭ fortepiano.

La du virinoj komence iradis flanko ĉe flanko, ĉirkaŭataj de la rajdantaro. Alberto, bonega rajdisto, enviis la taŭgan kaj pitoreskan rajdkostumon de siaj akompanantoj, kaj promesis al si mem, ke li mendos similan je la unua oportuna okazo. Li ĉiam estis en la unua vico kaj senĉese laŭdegis dona Lorenza.

— Vere, kara mia, viaj virinoj estas la ĉarmo enkorpiĝinta, li diris al sia kutima konfidenciulo; sed kiu do en Kordovo parolis al mi pri la mola senviveco de nia mastrino nomante ŝin *akvo dormanta*? Tiu virino estas el hidrargo. Vidu, per kia forto ŝi regas sian beston; oni kredus, ke ŝi estas ŝraŭbita sur sia selo, vidante, kiel ŝia korpo sekvas facile la movojn de tiu ĉi Andaluza ĉevalo, kiu, laŭ mi, certe estas la plej mirinda besto, kiun oni povas imagi. Se sinjorino Wilson akceptos miajn konsilojn, li aldonis mallaŭte, ŝi de tiu ĉi tago sidiĝos sur hamakon aŭ ĉevalon nur kiam interspaco da cent kilometroj disigos ŝin de tiu deloganta Lorenza.

La juna sekretario parolis sufiĉe laŭte, por ke siaj najbaroj aŭdu lin, kaj la Meksikanoj, preskaŭ similaj al la Francoj rilate al la nacia fiereco, ridetis kun aproba mieno.

Ili atingis la plej altan punkton de la montetoj, kiuj superas la valon, kaj ekvidiĝis ĉe la horizonto tuta serio da montsuproj, kelkaj kulturitaj, la aliaj ankoraŭ kovritaj de virgaj arbaroj. Malgraŭ lia okulvitro, la vidado de la legacia sekretario estis bonega, kaj li admiregis la belecon de la pejzaĝo. Kruta deklivo, diskovrita de ŝtonegoj, kondukis en la fundon de valeto, kiun mallarĝa torento trafluis. La suno, nun malkovrita, lumegis kiel fajro la ŝaŭmajn ondojn kaj similigis ilin al flamaj trenajoj. Baldaŭ la vojo fariĝis nur malebena vojeto, kaj la rajdantoj, devigitaj disiĝi, marŝigis siajn ĉevalojn dekstren kaj maldekstren por ne rajdi unu post alia.

— Ĉu vi amas galopi, *señor* Franco? ekdemandis Lorenza al Alberto, kiu penis rajdi apud ŝi.

— En via societo, *señora*, mi ĉion amas.

— Nu antaŭen! ekkriis la juna virino. Kaj, malstreĉinte la kondukilon de sia ĉevalo, ŝi ekkuris sur la krutan deklivon. Alberto, surprizita, ŝanceliĝis nur unu sekundon kaj sekvis sian maltime man gvidantinon. Alveninte al la fundo de la valeto, dona Lorenza trarajdis la torenton, kaj galope surrampis la bordkrutaĵon haltante nur sur plataĵo, kien Alberto kaj kelkaj rajdantoj atingis ŝin. Sin turninte, ŝi vidis la kantistinon sen ĉapelo, fortege sin tenantan je la selo, dum don Luis kaj la edzo de Quirina penis kvietigi ŝian ekscititan ĉevalon.

— Kio okazis do? demandis la kreolino kun surpriza tono.

— Tiu ĉi *señora* ne sciis deteni sian ĉevalon, diris rajdanto, kiu ĵus alvenis; ŝi nur sur la ebenaĵoj scias galopi.

— Jen plezuro, kiun ni baldaŭ donos al ŝi, mur-

muris dona Lorenza kun ia kruela esprimo, kiu surprizis Alberton.

Revenante tuj galopege, saltegigante sian beston tra la ŝtonegoj kaj la arbetoj, la kreolino alrajdis al la kantistino.

— Pardonon mi petas de vi pri mia senpripenco, *señora*, ŝi diris, galope malsupreniri monteton estas nur ludo en mia sovaĝa lando, kaj mi forgesis antaŭgardigi vin.

La kantistino, kiu ĵus estis riskinta fali, pri tiu malagrablo kulpigis sian ĉevalon.

— Ĉu plaĉus al vi rajdi mian ĉevalon?

— Certe ne, eĉ ĝia rigardo timigas min.

-- *Andaluzio* estas vera ŝafo, diris la kreolino karesante la beston per sia gantevestita maneto, oni farigas al ĝi ĉion, kion oni volas. Kaj, kiel pruvo de sia certigo, malgraŭ la malhelpaĵoj de la loko, ŝi ekdesegnis grandajn rondojn ĉirkaŭ la kantistino, kaj alvenis sur la plataĵon samtempe kun ŝi.

Ili trairis arbarojn. Ĉiam antaŭiranta, dona Lorenza ŝajnis ludi la rolon de gvidistino. Vidante ŝin troti, galopi, Alberto pli kaj pli admiris la nekompareblan rajdantaron, kiu, vojirante, drapiris sin per sia skarpo en dudeko da manieroj neatenditaj kaj logantaj. La rajdantoj Meksikaj, malmulte kutimigitaj paŝe rajdi, ekgalopis al sia samlandulino, kaj kune kun ili Alberto, kvankam la kantistino senĉese alvokis lin apud sin. Nur don Luis ne plendis, kaj li, kiu kutime donis ekzemplon pri la plej frenezaj kuraĝegaĵoj, staris pacience proksime al la timema fremdulino, kies ĉevalon li gardis zorge.

Ili alvenis sur ebenaĵon, kie sin paŝtis bovoviroj,

kaj la Meksikanoj, demetante siajn pezajn kapvestojn, ekkriis ĝojajn huraojn.

— Atentu pri via ĉevalo, *señora*, diris dona Lorenza kliniĝante al la kantistino; ekscitita de l' ekzemplo, ĝi eble volus sekvi nin denove.

Tuj forirante galopege, la kreolino rekte alrajdis al unu el la teruraj brutoj, kiujn oni vidis en la malproksimo. La bovoviro, komence ŝanceliĝanta, malrapide levis la kapon, rigardis kun sovaĝega okulo la malamikon, kiu venis por inciti lin, poste gratinte la teron per la piedo, ĝi blekis terure, kaj, ne atendente la renkontiĝon, kiu ŝajnis ĝin minaci, ĝi mem subite alkuregis al la rajdantino. Tiu ĉi tirante la kondukilon, igis sian ĉevalon turniĝi, kaj evitis la beston; la bovoviro malsukcesinte rekomencis ataki, sed dona Lorenza forkuris de ĝi. Ŝi malligis sian skarpon, kaj flirtigante la maldikan ŝtofon, ŝi prezentis ĝin kiel akirotaĵon al la furiozeco de sia atakanto. Iafoje, malakcelante la iradon de sia ĉevalo, ŝi ŝajnigis sin ĵus atingota, sed baldaŭ ŝi ree forkuris kvazaŭ ekfluganta birdo. Dum unu el tiuj kuradoj, ŝi venigis la bovoviron, frenezigitan de kolerego, apud la lokon, kie staris la kantistino, poste forlogis ĝin en la ebenaĵon, vidante, ke sinjorino Wilson, timegigita, forkuras al la arbaro. Kiam la kreolino, forlasinte sian kontraŭulon, revenis al siaj kunvojaĝantoj, ŝi estis akceptita per entuziasmegaj aplaŭdoj kaj kovrita de floroj, kiujn ŝiaj samlanduloj deŝiris de arbetoj por ilin manoplene ĵeti al ŝi.

Baldaŭ ĉiuj Meksikaj rajdantoj komencis la ĉasadon, kaj la ebenaĵo aliformiĝis en vastan cirkon, kie la bovoviroj ellaciĝis, persekutante la rapidajn rajdantojn, kiuj ilin incitegis, atakis kaj faligis teren. Don Luis, fine, ne povis kontraŭstari la deziron partopreni

en tiuj ludoj ofte mortigaj, kaj sin ĵetis en la arenon. Tuj spronpikante sian ĉevalon, Lorenza aliĝis al sia edzo kaj etendis al li manon por inviti lin kuri kune la kuradon nomitan en Meksiko *parejo*: nome, inciti bovoviron, poste peni kune por eviti la ekbatojn de la besto. Se pro mallerta taktiko, unu el la du rajdantoj estas devigita ellasi la manon de sia kunkuranto, li estas venkita. Tiu ĉi danĝera ludo postulas nekompareblan lertecon en la arto de la rajdado, kaj la geedzoj mirige sukcesis. Ili ankoraŭ sin tenis per la manoj, kiam ili revenis al la kantistino, lasinte post si, spireganta kaj laca, la kontraŭulon, kiu estis persekutinta ilin.

— La bovoviroj estas lertaj, fortaj kaj kuraĝaj, diris la kreolino kun fiereco kaj sufiĉe laŭte, por ke oni aŭdu ŝin; ili tamen ne sukcesis disigi nin.

Alberto, en la plej alta grado de l' entuziasmo, ne trovis sufiĉe da laŭdoj por glorigi la kuraĝon, la forton, la flekseblecon kaj la elegantecon de dona Lorenza, la virino la plej virina el ĉiuj, kiujn li estis renkontinta, li diris, ĉar ŝi konservis sian allogecon en tiuj danĝeroplennaj ekzercadoj.

Malfruiĝis; ili ekiris returne tra la arbaroj. Alberto, malgraŭ la kontraŭaĵoj de la vojo, penis vojiri apud dona Lorenza. La rigardo tiel profunda, tiel vivo-plena, tiel dolĉa de la bela kreolino maltrankviligis la cerbon de la juna Franco. Noktiĝis, la luno larĝa kaj brila leviĝis, arĝentigante tie ĉi kaj tie la vojeton jam sufiĉe larĝan, por ke oni povu marŝi duope sur ĝi. Aŭdiĝis malklaraj bruetoj, zumoj, krakoj de branĉoj, mallaŭtaj blekoj, movoj de flugiloj; sed baldaŭ regis la granda silento de l' senhomaj lokoj, kiun nur maltrankviligis la regula paŝbruo de la ĉevaloj.

Alberto, meze de la grandegaj arboj, kiuj ĉirkaŭis lin kaj al kiuj la luno donis strangegajn formojn, sentis sin ekscitita. Kun la vizaĝo karesata de venteto varmeta, bonodora, kies blovo apenaŭ movetis la foliojn, li marŝis kiel eble plej proksime de dona Lorenza, kiu, drapiriginte ĝis la okuloj per sia skarpo, ŝajnis aŭskulti la dolĉajn parolojn de sia akompananto. La juna Franco, preskaŭ neaŭdeble, parolis pri la poezio de la grandaj arbaroj, pri la ekscitoj de l' animo, pri la majesteco de la krepusko envolvanta la naturon per siaj vualoj, lulante ĝin per siaj mallaŭtigataj voĉoj por liveri ĝin ekdormintan en la brakojn de la nokto. La lingvaĵo de Alberto ne estis ĉiam tiel alte poeta; sed la vera Franco, l' estaĵo bona, honesta, sentimentala, kiu tiel ofte malprave sin kaŝas sub eksteraĵo mokema kaj skeptika, malkovrite vidiĝis en tiu ĉi momento ĉe la junulo impresita.

Dona Lorenza, silenta, ne interrompis la paroladon de la maltimema ĝentilhomo, ravata, ke ŝi retrovas en la sentoj de li esprimataj malklaran eĥon de la longaj interparoladoj, kiujn ŝi interŝanĝis kun sia edzo, kiam tiu ĉi, post la noktiĝo, sidiĝis ĉe ŝiaj piedoj, atendente la horon de la ripozo. La kreolino estis kontenta pri la okazintaĵoj de tiu ĉi tago; ŝi estis sukcesinta humiligi multfoje la fremdulinon, kaj tamen neniu povis kulpigi ŝin, ke ŝi forgesis la leĝon de la gastamo. Dum Alberto, kuraĝigita de la silentado de dona Lorenza fariĝis pli pasia en siaj diroj, tiu ĉi lasta revis pri sia edzo, kies rigardon, plena je maltrankvila amo, ŝi estis vidinta sekvantan ŝin dum ŝiaj danĝeroplennaj kuradoj.

Aliflanke, la kantistino ne estus estinta virino, se ŝia animo ne estus plenegigita de maldolĉa mal-

plaĉo ; ofendita, ŝi konvinkigis, ke ŝi estas oferit-
ulino inside allogita en kaptilon. De sia alveno en
Meksiklandon, ŝi estis konstante ĉirkaŭata de rondo
da humilaj adorantoj. Kaj jen subite ŝi vidas sin
translokita en la duan rangon, eĉ de siaj sam-
landuloj. Ŝi nomis dona Lorenza sovaĝulino ; sed,
en si mem, ŝi sentis, ke ŝi estas konkurantino sen-
pardona kaj timinda, al kiu ŝi ne povas pardoni la
videblan forgesemon de Alberto.

Kiam ili atingis la loĝejon, grandaj fajroj lum-
igis la malgrandan valon. Ili aliris la herbejon,
kie tablo ŝargita per manĝaĵoj atendis la promen-
intojn.

Ĉirkaŭ la naŭa, la kantistino ekdeziris foriri,
kaj sidiĝis en la palankenon de dona Lorenza. La
du virinoj nur tuŝis la manon unu al la alia, kaj
la fajra rigardo de la kreolino renkontis la rigardon
malhelan kaj malvarman de la kantistino. Don
Luis aperis sur ĉevalo, kaj marŝante antaŭe li
kondukis siajn gastojn ĝis la limoj de sia bieno,
ĝentileco deviga laŭ la leĝoj de l'etiketo.

De la teraso, dona Lorenza sekvis per la
okuloj la rajdirantaron. Ŝi sidis sur hamako kaj
Nilda malligis ŝiajn harojn. Ŝi sentis kruelan ĝojon
pro la humiligoj, kiujn ŝi kaŭzis al la fremdulino,
kaj profundan kontentiĝon pro la komplimentoj,
kiujn ŝi ree ricevis dum la vespermanĝo pri siaj
rajdistaj kuragegaĵoj. Ŝi aliris sian ĉambron, for-
permesis siajn servistinojn kaj ripozis en apogseĝo
apud la balkono. Nenia ventbloveto, nenia brueto ;
oni aŭdis kraketi la lastajn branĉojn de la esting-
iĝantaj fajroj. Iom post iom la juna virino mal-
kliniĝis ; pala, kun la dentoj premataj kaj la

rigardo senmova, vane aŭskultinte, ŝi denove mal-supreniris sur la terason. Mortigaj horoj pasis malrapide, forportante unu post alia la esperojn de la kreolino. Ŝi estis kredinta, ke la sorĉo, kiu allogis ŝian edzon estas forpelita ; ŝi estis revinta, ke de nun ŝi tenados apud si, parolantan al ŝi kiel ĉiuj pri ŝia beleco, tiun, por kiu sola ŝi ĝojis esti bela, kaj vane ŝi atendis. Malgaja, kun severaj okuloj, rigardante sian lagon, ŝi maldormis ankoraŭ, kiam don Luis, tre malfrue en la nokto, revenis hejmen, paŝante nur sur la pinto de la ŝuoj kredante, ke ŝi dormas.

V.

La balo organizita de la prefekto je la honoro de la kantistino, balo, kiu per sia belegeco superis tiun de la urbestro, okazis post kelke da tagoj, kaj dona Lorenza ree renkontis sian malamikon. La kreolino estis tro fiero, tro sinreganta, por ke ŝi vidigu la malamon, kiun malgraŭ si mem ŝi sentis, kiam ŝi vidis la fremdulinon ; sed ŝi penis por humiligi denove sian konkurantinon per sia virina supereco, kaj venki ŝin, por tiel diri, per ŝiaj propraj bataliloj. Don Luis ŝajnis priokupata pli ol iam pri la koketa Amerikanino ; dume Alberto, malgaja, senkuraĝigita, revema, ne kuraĝis fari konfidencion al iu ajn pri la maltrankvileco, kiun li sentis.

La eniro de dona Lorenza en la dancejon kaŭzis murmuron de admirego, tiom lerte la juna virino

estis elektinta tualeton taŭgan al sia beleco. Neniam vidiĝis io pli belega ol ŝiaj ŝultroj kaj ŝiaj brakoj, pli brila ol ŝiaj okuloj, pli freŝa ol ŝia buŝo, kaj pli koketa ol la girlando el ruĝaj kaj belaj floroj, per kiuj ŝi estis ornamenta siajn harojn. Ankaŭ tiun ĉi fojon ŝi estis malŝatinta la juvelojn, la diamantojn kaj la perlojn, fidinte al sia ĉarmeco. Je la granda surprizego de Quirina, ŝi vidiĝis vivoplena, gaja kaj agema, ŝi preterlasis nenan valson, nenan kvadrilon, kaj, kiel papilio, ŝi flirtis tra la tuta salono, gajigante ĉiujn grupojn per sia bela rido. Lasante al la kantistino la monopolon pri la melankolia graveco, pri la majesta seriozeco, la kreolino fariĝis birdo. Post la ekscitoj de polko, ŝi faliĝis en apogseĝon kun tiu mieno laca, tiu rigardo malcerta, tiu moleco, kiuj tiel bone taŭgis al ŝi. Poste ŝi subite alsaltis en la mezon de unu el tiuj Meksikaj dancoj, kiuj ankoraŭ ne estas tute senigitaj de la malseriozeco de la Hispanaj dancoj; sed dona Lorenza triumfis precipe en la Habanaj valsoj, en kiuj la dancantino, dolĉe lulata de malrapida muziko, ŝajnas endormiĝi sur la ŝultro de sia kavaliro. La kreolino estis la reĝino de tiu ĉi balo, organizita por la honoro de sinjorino Wilson, kaj la juna ambasadora sekretario ne estis sola por proklami tion.

— La Franco enamiĝis je vi, kara mia, diris dona Quirina al sia amikino ĉirkaŭ la tagiĝo.

— Ĉu vi kredas? respondis tiu ĉi kun rideto.

— Liaj okuloj ne forlasas vin. Cetere, kian magian trinkaĵon vi eltrovis, kiu tiel ebligas vin ensorĉi la virojn? Mia edzo ĵus certigis, ke vi estas pli bela ol la kantistino.

— Ĉu eble vi estas ĵaluza?

— Ne, Lorenza, mi vin konas ; eĉ mi vin konas sufiĉe por kompreni, ke en la nuna momento vi ludas ian teruran ludon.

— Vi eraras, Quirina, mi amuziĝas.

— Mi observas, kara mia, kaj mi rimarkas, ke por ĉia rigardo donacita de vi al la Franco, via edzo ricevas similan de sinjorino Wilson.

— Nu... piko kontraŭ piko.

— La ludo ne estas egala ; oni prenas de vi pli ol vi povas preni.

— Kion vi intencas diri per tiaj paroloj ?

— Promesu al mi, ke vi faros nenian skandalon, kion ajn mi sciigos al vi.

— Parolu, mia bona Quirina, mi povas ĉion aŭdi kuraĝe.

— Mi ne dubas pri via kuraĝo, sed mi timas vian koleregon.

— Mian koleregon ! diris la kreolino lasante fali siajn belajn brakojn kaj rigardante sian amikino tra la okulharoj de siaj duonfermitaj palpebroj.

Dona Quirina balancis la kapon kun duba mieno. — Sinjorino Wilson, ŝi diris per mallaŭta voĉo kliniĝante al Lorenza, forveturos Pueblon morgaŭ nokte.

— Bone ! jen agrabla novaĵo por vi, Quirina.

— Jes ; sed via edzo forveturos kun la kantistino ; tion ŝi promesigis al li.

Dona Lorenza ekkaptis la manradikon de sia amikino kaj fikse rigardis ŝin en la okulojn.

— Kiu diris tion al vi ? ŝi demandis akrete.

— Mia edzo. Vi dolorigas al mi la manon, kara mia !

Dona Lorenza fermis la okulojn, ŝiaj kuntiritaj fingroj malstreĉiĝis. Nu, ŝi diris per indiferenta voĉo, via edzo serĉis vin ; don Luis ne foriros.

En tiu ĉi momento, Alberto alvenis al la kreolino, kiun li estis invitinta por valso, kaj ŝi foriris mole apogiĝante sur la brakon de la juna Franco.

— Ĉu estas vere, ŝi demandis ne atendite, ke vi forveturos morgaŭ nokte ?

— Kiu sciigis tion al vi ?

— Iu, kiu pretendas, ke mi ne devas kredi viajn certigojn pri via sindonemeco.

Alberto ĵus estis respondota.

— Silentu ! diris la kreolino, oni povas aŭdi nin.

Post momento, ŝi ekprenis preterirante la brakon de sia edzo, kaj lasis la junan Francon ĉagrena, tial ke li ne povis klarigi sian penson. Baldaŭ estis tagiĝonta ; la virinoj forflugis, dona Lorenza, kiu estis montrinta la ekzemplon pri la foriro, per kaprico volis reiri piede hejmen. Ŝi esperis ke, marŝante flanko ĉe flanko kun ŝi, ŝia edzo faros konfidencion pri la vojaĝo farota de li ; li nur parolis al ŝi pri la sukceso, kiun ŝi ricevis, ŝin prenis en siajn brakojn por transiri la riveron, kaj estis afabla, servema, karesa. — Quirina mensogis, ripetis al si la kreolino ; li min amas kaj neniel intencas fari tian perfidaĵon.

Dum la morgaŭa tago, don Luis forestis nur la matenon ; dum la posttagmezo, li vizitis la bienon. Dona Lorenza okaze sciigis, ke de la tagiĝo, li forsendis al Kordovo kelkajn rajdĉevalojn kaj valizon.

— Ha ! ekkriis kun doloro la kreolino, tiu ĉi virino nepre volas, ke estu sango inter ŝi kaj mi !

Ŝi tagmanĝis sola kun sia edzo, kiu je la vespero estis kondukonta ŝin al la teatro. Ĉirkaŭ la sesa ŝi estis preta por foriri. La suno malleviĝis en purpura ĉielo, la aero estis peza kaj seka, la rabbirdoj realiris siajn nestojn pli frue ol kutime. La lago spegulante la ruĝajn nubojn ŝajnis plena je purpura sango.

— Forte blovos la suda vento dum la nokto, diris dona Lorenza ; ĉu ne estus pli saĝe resti hejme ?

— Kaj via teatra loĝio, kara mia, ĉu eble vi volus lasi ĝin neokupita ?

— Mi estas malgaja, daŭrigis la juna virino, malhelaj revoj turmentas min, mi sentas, ke mia feliĉo estas minacata. Ni restu, mi vin petegas.

Don Luis ĝentile liberigis sin el la ĉirkaŭpreno de sia edzino ; du larmoj brilis tra la okulharoj de la kreolino.

— Ĉu tio estas serioza ? li diris alproksimiĝante ; la suda vento blovos hodiaŭ vespere kaj tio efikas viajn nervojn. Restu hejme ; mi tuj foriros por sciigi, ke oni povas disponi vian loĝion.

— Ĉu tio estas tiel grava, ke vi mem penu pri ĝi ? Alsendu iun. Mi sidiĝos sur la teraso, vi vin metos ĉe miajn piedojn, ni interparolos, ĉu vi volas ?

— Volonte, diris don Luis.

Sed, anstataŭ sidiĝi, la *hacendero* ekpromenis laŭlonge kaj laŭlarĝe ; iam kaj iam, liaj maltrankvilaj rigardoj direktiĝis al la Kordova vojo.

— Li forŝteliĝos, pensis la juna virino, kaj, sin levante subite, ŝi ordonis, ke oni alportu sian palankenon.

— Mi volis provi vin, ŝi diris gajete ; vi cedis al mi, dankon, sed ĉar sinjorino Wilson kantas la lastan fojon, ni devas aŭdi ŝin ; ni foriru.

Don Luis, surprizita, sin turnis al sia edzino ; ŝi sin drapiris per sia skarpo, kaj la mallumo malhelpis al li distingi ŝiajn trajtojn.

— Bela kapriculino, li diris kisante al ŝi la manon ; ni foriru do, ĉar vi ĝin volas.

En tiu ĉi momento, ŝi estis tentata sin ĵeti en la brakojn de sia edzo, sciigi al li siajn timojn, siajn dolorojn tiel longe kaŝitajn ; sed ŝi sentis, ke la plorsingultoj premas ŝian gorgon, kaj ŝi ne volis plori. Don Luis zoninte sin je la glavo, kiun malofte forlasas la personoj de lia rango, sidiĝis sur ĉevalon ; post unu horo la geedzoj eniris la teatron.

Tuj kiam li vidis la kreolinon, Alberto alkuris kaj ŝin ne lasis plu. Dona Lorenza, iafoje pensema, sed pli ofte koketa, ŝajnis plezure aŭskulti la amindumaĵojn de la juna Franco, kiu iom post iom fariĝis pli entuziasmega. Kiam li esprimis la fortegon de sia admiro per pasiaj vortoj, dona Lorenza, sin turnante al li, balancis la kapon, kvazaŭ ŝi dubus, samtempe rigardante lin per okuloj veluraj kaj pasiaj, kies esprimo ebriigis lin.

— Mi povus kredi viajn konfesojn, don Alberto, se mi ne scius, ke vi foriros hodiaŭ vespere, je la tria, ŝi diris subite.

— Mi foriros forpelite de via indiferenteco, *señora* ; unu vorto de vi min altenus.

— Jesuo ! Ĉu miaj paroloj estas tiel potencaj ?

— Provu.

— Iu alia vin regas.

— Neniu krom vi, mi ĵuras. Kial mi ne povas,

aldonis la juna diplomato, kunigante la manojn kaj preta por meti genuon teren, vidi vin aliloke ol publike, montri al vi mian koron malkaŝe !

— Ĉu vi ne konas la vojon al mia bieno ?

— Ĉu vi permesas, ke mi vizitu vin ĉe via hejmo ?

— Jes, certe, nia sojlo estas fermita nur por niaj malamikoj.

— Kiam ?

Don Luis forestis dum ĉiu akto ; dona Lorenza en tiu ĉi momento vidis lin sur la sojlo de la loĝio, kaj ŝi ne retiris sian manon, kiun tenis Alberto. — Ha ! ŝi diris iom laŭtigante sian voĉon, morgaŭ, postmorgaŭ, ĉiujn tagojn, mi ĉiam estas tie. Post du horoj, ekzemple, mi revados sur mia balkono, fumante, laŭ la malbeleta kutimo, pri kiu vi riproĉas miajn samlandulinojn.

Don Luis ne lasis al la junulo la tempon por respondi ; li subite eniris la loĝion en la momento, kiam la kurteno leviĝis. Kun palaj lipoj, fajroplenaj okuloj, la *hidalgo* rigardis sian edzinon dolore kaj mirege, kaj la Francon minace. Kiam post la lasta akto malleviĝis la kurteno, ĝi estis Alberto, kiu, serveme, kovris la ŝultrojn de dona Lorenza per ŝia mantelo ; li eĉ ĵus estis prezentonta al ŝi la brakon, kiam don Luis malhelpis lin.

— Ĝis la revido, *señora*, diris la Franco akcentante tiujn vortojn.

— Ĝis la revido, respondis la kreolino, salutante lin per dolĉa rigardo. Ĉu vi akompanos min hejmen ? ŝi demandis sian edzon.

— Ne ; sinjorino Wilson forveturos hodiaŭan nokton, kaj mi devas resti por adiaŭi ŝin.

— Ĉu viaj adiaŭoj estos tiel longaj, ke mi ne povos atendi vin ? Iru kaj revenu ; ĉar mi havas konfidenciojn por fari al vi.

Don Luis ŝajnis ŝanceliĝi.

— Foriru, li diris, mi revenos al Santa-Rosa nur morgaŭ.

— Ĝis la revido, *señor*, diris la kreolino al la legaciano, kiu sekvinte la geedzojn, salutis ilin denove.

Dona Lorenza sentis, ke ŝia edzo ektemetas. Ŝi sidiĝis en sian palankenon.

— Adiaŭ, ŝi diris al li.

Li longe rigardadis ŝin kaj respondis : — Ĝis la revido.

En la momento, kiam la portistoj ekmarŝis, varmega ventego trapasis la urbon ; la timinda suda vento fine ekblovegis, balaante de Vera-Kruzo ĝis Pueblo la ebenaĵojn kaj la altaĵojn. Kiam dona Lorenza eniris la oranĝujan arbaron, sonoritis la dekunua en la sonorilejo de Kordovo. La arboj, furioze skuataj, bruege interfrapis siajn branĉojn. La bruliga blovo, kies apero sur la Meksiklandaj bordoj estas tiel timata kiel la apero de turnventego, muĝigis la aeron en la malproksimaĵo, kaj antaŭ si forpelis amasojn da polvo, da folioj kaj da branĉetoj.

Reveninte hejmen, dona Lorenza, ne demetinte siajn festornamaĵojn, envolvis sin per skarpo. Per komanda voĉo si ordonis, ke oni starigu en la salono du lumigilojn kun ventŝirmiletoj, kaj vokigis siajn sangmiksajn servistinojn. — Restu tie, ŝi diris, montrante al ili la fundon de l'apartamento, kaj kion ajn vi aŭdos, kio ajn okazos, neniu el vi moviĝu.

La juna virino per paŝado rapida, febra, tra-iradis senĉese la vastegan ĉambron kvazaŭ leonino en kaĝo. Ŝiaj belaj trajtoj havis doloran esprimon, ŝia buŝo estis kuntirita, ŝiaj okuloj, senmovaj kaj malafablaj, ŝajnis pligrandigitaj. Neniam ŝiaj servistinoj estis vidintaj ŝin tia; premataj unu kontraŭ alia pro teruro, ili rigardis sian mastrinon irantan, revenantan, haltantan, nur kiam ventego blovis tra la valo kaj turniĝadis fajfante ĉirkaŭ l'antikva loĝejo.

Malgraŭ la ventego, la kreolino aliris la balkonon. La ĉielo estis blua, la luno ĵus estis malaperinta, kaj la lumeco de la steloj, helega en la tropikaj landoj, lumetigis la malgrandan valon. La ekblovoj, pli kaj pli oftaj, furiozaj, fariĝis timegindaj; post la ekblovo, regis grandega silento, kvazaŭ mil plendaj voĉoj ĝemus en la malproksimaĵo. La bruaro plifortiĝis, alkuris, alproksimiĝis kaj terure eksplodis; ŝajnis tiam, ke nevidebla hundaro, al kies bojado miksiĝis ploregoj, trakuris la verdan herbejon. La arboj krakis, la ŝtonoj interfrapiĝis, la domo, senĉese skuata, ŝanceliĝis. Iafoje vulturo, forpelita el sia nesto, aŭdigis ekkrion de malespero, sentante sin forpelita tra la nokto.

Subite dona Lorenza eksentis, ke la tero tremas sub ŝiaj piedoj; efektive iom tremis la tero, kiel okazas plej ofte dum tiaj teruraj turnventegoj tropikaj. Aŭdiĝis bruo kvazaŭ ondoj moviĝantaj, la rigardoj de la kreolino instinkte turniĝis al du palmoj, sed ĝi estis nur la vento, kiu blovante tra la foliaro de tiuj du belaj arboj imitis la bruon de la mortantaj ondoj. Dona Lorenza turnis sin al la lago kaj surprizite repaŝis; la ebena supraĵo, sur kiu kutime glitis la blovo de la fulmotondroj, ne suk-

cesante malkvietigi ĝin, agitiĝis kvazaŭ ĝi bolegus, kaj, blanka de ŝaŭmo, superverŝiĝis sur la herbejon.

— Ha ! ekkriis la juna virino ekkaptante sian bruston per ambaŭ manoj, ĉie fulmotondro hodiaŭ !

— Kaj, fortirinte la kolĉenon, kiu ornamis ŝian kolon, superstiĉe ŝi ĵetis ĝin al la lago.

Ŝi aliris la fundon de la ĉambro ; ŝiaj servistinoj, genufleksinte, preĝis laŭte. Ŝi eltiris sian horloĝeton por vidi la horon, kiun ĝi montras, kaj, ĵetinte la delikatan juvelon sur la plankon, ŝi febre frakasis ĝin per sia piedo. — Mortu, ŝi diris, vi, kiu elmontras tiun malbenitan horon !

Ŝi revenis sur la balkonon, kaj baldaŭ, kun orelo atenta, kun la naztruoj larĝe malfermitaj, paŝon post paŝo ŝi malantaŭen iris al statueto de la Virgulino. Al ŝi ŝajnis, ke ŝi distingas, meze de l'ventaj plendoj, apartan bruon nur aŭdeblan de ŝi ; ŝia paleco estis timiga, ŝia brusto saltegis. Voĉo aŭdiĝis :

— Virgulino sankta, ŝi ekkriis levante al la statueto siajn belajn brakojn, kiuj tordiĝis, vi scias, ke mi estis prava.

Eksonis pafo, poste bruo de paŝado sekvata de krio de doloro. La vento silentis, oni aŭdis frotadon de ŝtalaĵo kontraŭ la ŝtonoj de la balkono, kaj la servistinoj ĉirkaŭis la mastrinon, vidinte aperi don Luis kun haroj malordigitaj, kun glavo en la mano. Ekvidinte la grupon da virinoj, la *hidalgo* faligis teren sian sangoplenan armilon. — Mi vin atendis, diris dona Lorenza kun tremanta voĉo, mi bone sciis, ke vi ankoraŭ amas min kaj ke vi venos.

Ŝi alproksimiĝis kun la manoj aletenditaj ; don Luis repaŝis.

— Mi vin atendis, ŝi daŭrigis energie ; mi ne volis, ke vi foriru kune kun tiu virino ; mi neniam estus pardoninta vin. Mi pikis al vi la koron per la ĵaluzo, mi defendis mian feliĉon.

Ĝemo, plendo, alvoko aŭdiĝis en tiu momento el la malsupro de la balkono.

— La Franco ekmortas, korpremite ekkriis don Luis.

Tiam, rapidegante al sia edzo, ĉirkaŭante lin per siaj brakoj, levante lin per freneza ĉirkaŭpremo :

— Estas sensignife ! diris la kreolino kun sovaĝa, kruela voĉo, ĉar vi estas tie ĉi kaj mi amas vin !

*

* *

SinJORINO Wilson forveturis sola kaj ĉagrenadum tiu ĉi terura nokto, kies okazintaĵoj ŝi konis nur pli poste ; ŝi ekmalamis Meksiklandon, kie ŝi restis nur mallongan tempon. Don Luis havas sur la maldekstra ŝultro malgrandan cikatron, kaj prefere sur tiun ĉi ŝultron apogiĝas dona Lorenza, eĉ kiam ŝi balanciĝas en sia hamako apud sia edzo. Pri S-ro Alberto de Vieilleville, kiu sentis sian bruston trapikita de glavo antaŭ ol li povis uzi duan fojon la revolveron, per kiu li sin estis arminta por sia nokta aventuro, li ŝuldis la vivon al la zorgoj de doktoro Bernagius, tuj alvokita el Orizavo, kaj kiu forveturigis lin Eŭropon, tuj kiam li konstatis lian ekresaniĝon. Alberto volonte rakontas sian aventuron : ĝi neniel malutilis al li en la estimo de la Parizaninoj ; li tute kredas, ke li estis amata de

dona Lorenza ; — jen iluzio, kiu kostis al li sufiĉe kare ; tial al li ni lasu ĝin.

Post la terura ventego, kiu maltrankviligis ĝian kvietecon, oni konstatis, ke la supraĵo de la lago plimalaltiĝis. De tiam, ĉar ĝia akvo sendube trovis subteran elirejon, ĝi ĉiujare plimalgrandiĝas, kun-tiriĝas en sia ŝtonega kuvo. Doktoro Bernagius, en unu el siaj verketoj, pruvis per hipotezoj tiel lertaj, kiel sciencoplenaj, ke fine la lago Santa-Rosa fariĝos seka, kaj ke ĝia akvo dormanta de nun ne timas plu la malkvietigon de la ventegoj....

L. BIART.

Tradukis : « LOTUS ».